I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N°3 Decembro 1955

## 8-a I.F.E.F.- KOGRESO EN STOKHOLMO
## 13 - 18-a de MAJO 1956

INFORMILO 1

Korespondadreso de la L.K.K.: B.Örtengren, Schultzväg 39, SOLNA, Svedio
Adreso de la kasisto: J.A.Nordin, SJ Bost. 9 i, SOLNA, Svedio. Girkonto: 49 59 89.
La kongreskomitato konsistas el jenaj personoj: Ernst Eriksson, honora prezidanto; Hjalmarr Olsson, prezidanto; Bertil Örtengren, Josef Nordin, Boor Lindström, Folke Petterson, Gustav Sundsvist, Herbort Malmsten.
Kongresejo: Medborgarhuset (Civitana domo) situanta en la suda parto de la urbo atingebla per aùtobusoj 33, 34, 59 kaj 73 de la Centra Stacidomo. Haltejo "Medborgarplatsen" (Civitana placo).

### KONGRESA PROGRAMO

**Dimanĉo la 13-a de Majo:**

8,30 Malfermo de la akceptejo en la Centra Stacidomo (malfermita ĝis la 19-a horo)
18,30 Malfermo de la ekspozicio en la halo de la kongresejo.
20,00 Solena malfermo de la kongreso en la granda salono.

**Lundo la 14-a de Majo:**

9,00 Malfermo de la akceptejo en la kongresejo kaj de la poŝtoficejo.
9,30 Kunsido IFEF-estraro kaj delegitoj. - Ekskurso por familianoj. Kolektiĝo antaù la kongresejo.
12,30 Lunĉo.
13,30 Fotografiĝo antaù la kongresejo.
14,00 Kunsido de la Terminara Komitato.
18,00 Vespermanĝo.
20,00 Interfratiĝa vespero en Vinterpalatset (Vintro-palaco) Norra Bantorget (Norda relvoja placo), triminuta irado de la Centra Stacidomo.

**Mardo la 15-a de Majo:**

9,00 Unua laborkunsido. Ekskurso por familianoj.
12,30 Lunĉo
13,30 Ekskurso per aùtobusoj al la lokomotiva kaj vagona riparejoj kaj la tolaĵlavejo Hagalund kaj rondveturado en la urbo.
16,30 Vespermanĝo kaj poste daùrigo de la rondveturado, kiu finiĝos ĉe Skansen apud la jubilea ekspozicio pro la centjara ekzistado de la Svedaj Fervojoj. Post tio promenado en Skansen, por rigardi kiel, la svedaj kamparanoj loĝis antaù kelkjarcentoj en tiutempaj loĝejoj, jokitaj en origine fidela ĉirkaùaĵo.

**Merkredo la 16-a de Majo:**

9,00 Dua laborkunsido. Ekskurso por familianoj.
12,30 Lunĉo.
13,30 Tria laborkunsido kaj fakaj prelegoj.
18,00 Vespermanĝo, kaj poste je la 19,30 Amuza vespero

Ĵaŭdo la 17-a de Majo:

9,00 Tuttaga ekskurso per ŝipo aŭ aŭtobuso al Gustavsberg kaj Saltsöbaden (Sala banloko) en Stokholma arĥipelaro. En Gustavsberg ni vidos la fabrikadon de porcelano en la kooperativa fabriko.

15,00 Manĝo en la restoracio de Saltsöbaden. Reveturo al Stokholmo.

Vendredo la 18-a de Majo:

9,00 Daŭrigo de la fakaj prelegoj.

Aliĝilo estas aldonata en tiu ĉi numero. Bonvolu zorge plenigi ĝin kaj uzu ĝin tuj, por esti certa ricevi loĝejon favoran je prezo kaj situo en la urbo. La demandon pri ekskursoj vi nepre respondu pro la kalkulado de la partoprenontoj. Pri la kotizo rigardu la aliĝilon.

T O M B O L O:

Por plifortigi la ĉefkason kaj havi la eblon eldoni pli ampleksan Bultenon, ni aranĝos tombolon dum la kongreso.

Ni tial afable al vi petas kumporti ian donacon, konvenan por la lotumado.

Ni esperas kaj eĉ certe kredas, ke vi havos agrablajn tagojn en tiu ĉi regiono de la mondo. Ni salutas vin kore bonvenaj al la Norda Venecio Stokholmo.

Por la Kongresa Komitato La prezidanto: H.Olsson.

R A D I O   R O M A - E S P E R A N T O - Casella postale 320 ROMA (Italia)

Dissendoj en ESPERANTO

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (laŭ M.E.T.)

Stacioj: metroj 30,90 = Mc/s.9,71-metroj 41,15 = Mc/s.7,29-metroj 50,34 = Mc/s.5,96

DECEMBRO 1955-a

570 vendredon la 2-an - La Radio kaj la Blinduloj okaze de la sesdeka datreveno de la malkovro de la Radio

571 merkredon la 7-an - Mondo esperantista: "Jubileo de la Roma Esperantista Grupo"

572 vendredon la 9-an - Leterkesto kaj bibliografio

573 merkredon la 14-an - Novajoj el Italujo

574 vendredon la 16-an - Italaj turismaj urboj: "Massa kaj Carrara"

575 merkredon la 21-an - Honorigoj al Zamenhof

576 vendredon la 23-an - Kristnasko

577 merkredon la 28-an - Romo dum vintro

578 vendredon la 30-an - Finjaro kaj Novjaro

FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON

JANUARO 1956-a

579 merkredon la 4-an - Mondo esperantista

580 vendredon la 6-an - Epifanio

581 merkredon la 11-an - Novajoj el Italujo

582 vendredon la 13-an - Leterkesto kaj bibliografio

583 merkredon la 18-an - Nia Gazeto

584 vendredon la 20-an - Promenado tra Napolo

585 merkredon la 25-an - Sicilio insulo de printempo

586 vendredon la 27-an - Mozart en Italujo (okaze de la 200-jara datreveno de la naskiĝo).

Prelegantoj: merkrede - S-ro Luigi MINNAJA
vendrede - Prof. Dr.Vincenzo MUSELLA

La fakestro: BLASIMME

D-ro Hideo SHINODA (Yamagata - Japanio) en Aŭstrio

De Aŭstria Esperanto - Revuo ni scias ke okaze de sia mondvojaĝo vizitis Aŭstrio, D-ro H.Shinoda, fama japana hirurgo kaj konata samideano.

En Vieno sabate la 3-an de decembro je 17-a horo li faris en la Urania lumbildparoladon pri sia hejmlandon. Post la lumbildparolado okazis je h.19,30 en gastejo Pankl, Wien I., Amika Kunveno de la Viena samideanoj kun la gasto.

Post Wien s-ano Shinoda ankaŭ vizitis Graz, Salzburg kaj Innsbruck.

# ALIĜILO

al la 8-a IFEF-kongreso 13 - 18 majo 1956 en Stockholm, Svedio.
Adreso al la kasisto: J.A. Nordin, SJ bost. 9 i, Solna. Svedio. Ĝirokonto 495989.

Kongresano: S-ro, S-ino, Pensiulo . . . . . . . . . . . . . . Antaŭnomo . . . . . . . .
Adreso . . . . . . Loko . . . . Lando . . . . .Parolas esperanton Jes ☐ Ne ☐
Skribu preslitere!
Familiano : Edzino, Filino, Filo . . . . . . . . .Parolas esperanton Jes ☐ Ne ☐
Simpatianto: S-ro, S-ino . . . . . . . . . . Antaŭnomo . . . . . . . . . . . .
(Kiu ne venos al kongreso)
Adreso . . . . . . . . . . . . .Loko . . . . . . . . . . Lando . . . . . . .
Kongreskotizo: kongresano 15- sv. kr. familiano kaj pensiulo 7,50 kr, simpatianto 5-kr
Ĉiuj ricevos la kongresan dokumentaron.

Mendo de loĝejo dum la noktoj:

| 12/13 | 13/14 | 14/15 | 15/16 | 16/17 | 17/18 | 18/19 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |

Bonvolu indiki per x en la kvarangulo.
En Stokholma studhejmo 3,50 per lito, sen littuko ☐
" " " 4,50 kr per lito kun littuko ☐
Inter 2 ĝis 12 litoj en sama ĉambro. Nur 60 litoj Servmono enkalkulita.
Trimimita iro de la centra stacidomo.

En Tullgården, Skanstull 5,50 kr per lito, sen littuko ☐
" " " 6,50 " " " , kun littuko ☐
Du litoj en ĉiuj ĉambroj. Nur 55 ĉambroj. Servmono enkalkulita. Dekminuta iro al la kongresejo.

En hotelo je prezo de 7 - 9 kr per lito ☐
" " " " "10 - 15 " " " ☐

Mi deziras loĝi sole ☐ kune kun . . . . . . . kune kun alia aŭ aliaj ☐

Komuna manĝo ĉe la manĝejoj "Fatbur" kaj "Blomsterfonden" je prezo de 3,75 kr pofoje (lunĉo aŭ tagmanĝo) dum tri tagoj. Servmoo enkalkulita.
Mi mendas 6 manĝkuponojn je prezo de 22,50 popersone por . . . . personoj kaj antaŭpagas.
Mi partoprenos la rondveturon en la urbo per aŭtobuso. Senkoste. Jes ☐ Ne ☐
" " en la ekskurso per ŝipo au aŭtobuso al Gustavsberg kaj Saltsjöbaden (Sala banloko) en la Stokholma arĥipelago ĵaŭde la 17-an Senkoste. Jes ☐ Ne ☐
Por lunĉo en Saltsjöbaden je prezo de 3,50 kr mi antaŭpagas.
Pri speciala deziro bonvolu noti ĉi tie . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

| | | | |
|---|---|---|---|
| Miaj pagoj entute estas : | kongresano | sv.kr. | . . . . . . . . . . |
| | familiano | " " | . . . . . . . . . |
| | simpatianto | " " | . . . . . . . . . |
| | por manĝkuponoj | " " | . . . . . . . . . |
| | por manĝo en Saltsjöbaden | " " | |
| | Entute | sv.kr. | _ _ _ _ _ _ _ _ _ |

Aliĝo validas nur kun samtempa pago.
Mi alvenos al Stockholm la . . . . .an de majo je la . . . . horo
. . . . . . . . . . . la . . . . . . an de . . . . .195

. . . . . . . . . . .
Subskribo